

## & Nigra tago:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 574 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:41> (

/(La Lado doLa So So2Ti TiLa; La Lado doLa SoTi LaLa;)×

(#Rekantaĵe: do doTi TiSo MiMi LaLa; do doTi TiSo MiMi La; do doTi TiSo MiMi LaLa; do doTi TiSo MiMi La a)

)×14 )+

### (&Strofoj:

#### ,& Unua:

'1 /Okazi povas, ke ke2lkfoje ; – Kvazaŭ vi portus sarkofagon ; – Vi rampas tra la viv' se2nĝoje ; Kaj fakte havas "nigran tagon".

(×:; **Pikas abelo se vi ridas ; Pikas abelo, ho, dolor' ; Dolĉas mielo sed vi sidas ; Dolĉa mielo estas for.**)

#### ,& Dua:

'2 Ĝi komenciĝis jam matene ; Kun peĉ-aŭgura malfavor' ; Ĉar via vekhorloĝ' kretene ; Ne bruis je la ĝusta hor' ; .....

'3 Kaj tial sekvis ordinare ; Ke dum rapida raz-klopod' ; Vi vundis vin, – kaj temp-malŝpare ; Nun lavi devis vin per jod'.. .....

'4 Jen la kolum-buton' obstine ; Incitis vin pro stulta spit' ; Ĝis kiam ĝin vi fine.. fine.. ; Retrovis ie sub la lit'! .....

'5 Vi trinkos iom nun da kafo ; Sed – kuirita en infer' – ; Ĝi estis brula kiel lafo ; Kaj vi forkuris en koler' ; .....

'6 Por trafi tramon ĉe l' stacio ; Vi havis premon de ciklon' ; Sed al hundaĉ' ne plaĉis tio ; Ĝi kaptis vin je l' pantalon' ; .....

'7 Kaj ĝiaj dentoj la detruon ; Pli "funde" faris ol skalpel' ; Sur la postaĵo larĝan truon ; Vi honte maskis per ĉapel'! .....

'8 En l' oficejon tre malfrue ; Vi venis je la deka hor' ; Dum la kolegoj pli ol brue ; Akceptis vin per moka ĥor' ; .....

'9 La ĉefo ankaŭ ne gratulis ; Vin, malgraŭ lerta ŝajn-ekskuz' ; Kaj grumblopreta vi makulis ; La kontolibrojn pro konfuz'.. .....

'10 Post taglabor' vi volis spiri ; En paca hejmo sen ĉagren' ; Sed vanis tion ĉi esperi ; Ĉar vin atendis nova pen' ; .....

'11 L' edzin' kriaĉis kun la bubo ; Kaj bruligita estis riz' ; Vi kuris for, – sed en la klubo ; Kasisto petis pri l' kotiz' ! .....

'12 Vi tiam en gazetoj provis ; La ĝojon trovi de l' vesper' ; Sed en gazetoj, ve!.. vi trovis ; Nur artikolojn pri Scherer.. .....

'13 Vi hemeniris – (por protesti) – ; Pli frue do ol laŭ kutim' ; Kaj vidis tial.. sin revesti ; L' edzin-amikon en intim'! .....

'14 Vi ĝemis nun, ĉar ĉi eksceso ; Transpasis forton kaj imagon ; Kaj nete restis la impresio ; Ke vi travivis.. "nigran tagon". .....